

---

 INFORMILO DE LA FLANDRA FEDERACIO DE LABORISTAJ ESPERANTISTOJ
 

---

 NENIA VENKO SEN BATALO.
 

---

De ĉiuj flankoj sonas alarmsignoloj pro la stagnado de la esperantomovado. En si mem tio estas bona afero, ĉar ĝi signifas ke la esperantistoj fine vekigis el sia letargio.

Spertinte la evoluon de Esperanto al matura kaj plenvalora lingvo, la esperantistoj naive kredis ke la mondo volonte akceptos ĝin kiel solvon de la ĉiutage pli akre sentata bezono de komuna mondlingvo. Ili atendis, esperis kaj revis ... ĝis skuis ilin la kruda rifuzo de "la mondo", t.e. de la plej altaj politikaj instancoj, eĉ nur konsideri ilian solvon. Ili ekkonsciis ke malamikaj fortoj malebligas la racian solvon de la mondlingva problemo kaj ke la matureco kaj taŭgeco de Esperanto ne sufiĉas por kontraŭbatali ilin.

Evidentiĝis ke la esperantomovado devas eliri el sia ebura turo kaj kun novaj metodoj turni sin al la neesperantista mondo. Iuj, pensante kiel prezidanto Franz Jonas de Aŭstrio ke la esperantistoj "ne atendu tro multe kaj ne postulu tro multe de la oficialaj funkciuloj, sed fidu pli la propran forton" (Esperanto, sept. 1970), ekagadis en la medioj de la praktika ĉiutaga vivo kiel komerco, trafiko, sporto, turismo, ktp, klopodante tie efektiviĝi la uzadon de Esperanto. Aliaj, kiel la junuloj de TEJO kaj la gvidantoj de la belgaj esperantoorganizaĵoj, faris timidan provon "Ni iri al la amaso" en la formo de modesta surstrata manifestacio. Kaj la artikoloj, kiuj lastatempe pli kaj pli ofte aperas en la esperantogazetaro pledantaj por "scienciga argumentado pri la mondlingva problemo", estas nenio alia ol la reagomaniero de la intelektuloj en la esperantomovado kontraŭ ties stagnado. Ĉiuj serĉas novajn vojojn, sed estas kvazaŭ palpado de blinduloj kaj la ĝustan vojon oni ne trovas. Aŭ ĉu oni konas la ĝustan vojon sed ne kuraĝas ĝin suriri ?

Antaŭ du jaroj (Deklaracio de Tyresö) oni povis kredi ke TEJO estis preta iri en la ĝusta direkto, sed poste nenio plu okazis en tiu senco. Ĉu TEJO eble ne havas sufiĉan ageblon en la kadro de UEA ?

Post trijara vana kampanjo far la aŭtoro de tiu ĉi artikolo por aktivista ekstermovada premgrupo, la belgaj esperantoorganizaĵoj preferis fari mem modestan manifestacion antaŭ la domo de la belga televido demandante la elsendadon de esperantokurso, nature senrezulte.

En siaj "Dek tezoj" (Heroldo de Esperanto, n-ro 10 (1509), 10.7.1971) D-ro Werner Bormann diras ke "la naciaj registaroj decidis" (2a tezo) kaj ke "ni estas premgrupo kontraŭ la decidrajtaj politikistoj" (9a tezo). Se anstataŭ la vorto "estas" en la 9a tezo troviĝus "estu", tiuj asertoj estus tute pravaj, almenaŭ se "ni" estus "la esperantistaro". Tamen laŭ la starpunkto de W. B. "ni" estas UEA kaj la landaj asocioj. Sed tio estas iluzio ! se almenaŭ oni ne konsideras premgrupo organizaĵon kiu kun ĉapelo en la manco humile proponas kaj petas.

Oni ne miskomprenu min. Mi neniel volas minimumigi la intereson de UEA kaj de la L. A. Ili estas ege valeraj kaj alte taksindaj kiel organoj de kultura movado, sed ne kiel premgrupo. Premgrupo estas organizaĵo kiu aktive, konstante, persiste, konteste kaj agrese denuncas la lingvajn imperismon kaj diskriminacion, la erarojn starpunktojn, la indiferentecon, hipokritecon, perfidon ktp de la politikistoj, kaj kuraĝe batalas por la oficialigo kaj deviga instruado de Esperanto kiel sola komuna mondlingvo.

UEA kaj la Landaj Asocioj ne povas ludi la rolon de vera premgrupo, unue ĉar ili estas tro malfortaj kaj due, kaj precipe, ĉar ili estas tro integriĝintaj en la kontestatan sistemon. Kaj tion scias Dro W. Bormann tre bone kaj tial, dirante ke ni estas (li devus diri : estu) politika movado, speco de premgrupo kontraŭ la decidortaj politikistoj, li tuj minimumige aldonas "kulturpolitika movado" kaj "la normala demokrata entrepreno ĉie permesata, ebla en Okcidento kaj Oriento". La mondlingva problemo estas ne nur kultura, sed antaŭ ĉio socia demando kaj tial ni estu ne nur kulturpolitika sed antaŭ ĉio socipolitika movado. Kaj se nia premgrupo kompreneble ne celu perfortan revolucion, esti la "normala, demokrata entrepreno ĉie permesata" tamen neniel signifas : esti nekontestema, nebatalema, almozetanta societo.

Kion ni bezonas, tio estas amasa aktivista kiel supre priskribita premgrupo aganta ekster la nuna esperantomovado kaj sendepende de ĝi. Tio kreus cetere la avantaĝon ke la "oficiala" esperantomovado, UEA, kvazaŭ la registaro de Esperantio, povus eventuale distanciĝi de la "neoficiala" premgrupo en la kazo ke ties agado malplaĉus al iu politika aŭ registara instanco.

Iuj pensas ke estas necble starigi tian amasan premgrupon. Sed ilian dubon kaŭzas nur la fakto ke ili ne kredas je la amaso. Ĉu ni ne povis legi ke "la nova subskriba kampanjo de UEA baziĝas sur la ĝusta (?) ekkono, ke ne plu eblas instigi la politikistojn al paŝoj per amasa movado" ? (Interlingvistika Informa Servo, n-ro 3/1971). Tiun aserton de Dro Artur Bormann oni povas kompreni nur tiel, ke "amasa movado por instigi la politikistojn", t.e. "amasa premgrupo", ne plu eblas. Sed kiel oni povas aserti tion, se la esperantomovado neniam faris eĉ la plej malgrandan klopodon starigi tian amasan premgrupon ?

Estas vere ke multaj asocioj, partioj, eklezioj, sindikatoj ktp suferas pro ĝenerala neemo fariĝi membro (1a tezo de Dro W. Bormann), sed tio koncernas nur la "establitajn" organizaĵojn. La nuntempa homo ne nur ne amas aliĝi al tiuj organizaĵoj, sed fakte kontestas ilin ĉar ili estas integriĝintaj en la "establitajn sistemon" de kiu li sentas sin trompita. La kontestataj movadoj kontraŭe prosperas.

La situacio estas simila en la esperantomovado. La membroj estas ĝenerale, ja preskaŭ ekskluzive varbataj far la lokaj grupoj. Pere de la kursoj organizitaj far la grupoj ĉiujare aliĝas certa nombro da novaj membroj, sed ĉiujaro ankaŭ ekŝiĝas sama aŭ pli granda nombro da membroj, ĉar ili konstatas ke ili trafis en grupon kiu de la konataj anglaj, francaj, rusaj aŭ alilingvaj kluboj diferencas nur per tio ke Esperanto ne estas tuj praktike uzebla kaj ke la grupa agado neniel antaŭvidigas ĝian baldaŭan uzeblecon.

Aktivista premgrupo, kies konstanta batalo naskas kaj subtenas la perspektivon de la venko kaj per ĝi stimulas la batalpretecon de la membroj, certe ne konas la dizertadon de la seniluziigitaj kaj neeviteble devos atingi bonajn rezultojn.

Konkludo : Ni aplaŭdu al ĉiaj, ĉu individuaj ĉu grupaj, agadoj por Esperanto, sed antaŭ kaj super ĉio ni urĝe starigu aktivistan movadon, kiu koncentru ĉiujn siajn fortojn sur la venkovolan batalon kontraŭ la malamiko de Esperanto kaj por la oficialigo kaj deviga instruado de nia lingvo.

Hector Boffejon, Zegersdreef 95, Brasschaat.

DEZIRAS KORESPONDI.

-----

Pere de Samideano Petro NOTAERTS el Dilbeek, ni ekscias ke nia samideano Sinjoro T o d o r a r C r a c i u n, casuta postala 13 N A S A U D jud. Bistrita Nasaud, Runanio, deziras korespondi kun seriozaj belgaj virinoj.

ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN LEIPZIGO.

-----

Esperantista renkontiĝo dum Foiro en Leipzig (GDR) okazos 11.3.1972 en Klubo de la Inteligentularo "Gottfried-Wilhelm-Leibnitz", 701 Leipzig, Elsterstr. 35 je la 19, 30-a horo.

## FEDERACIA RUBRIKO.

### Sekcio GENT.

Ni bedaŭras havi la devon komenci tiun-ĉi rubrikon per la anonco de la morto de nia amiko Emiel VAN OOTEGHEM. Kvankam li mem neniam lernis Esperanton, li plene agnoskis la utilecon de nia strebado.

Depost lia edziĝo kun nia kamaradino Corry DE COCK, li ĉiam ĝojis ricevi esperantistojn kiel gastojn en sia domo de BASSEVELDE.

### Zamenhoffesto.

La Zamenhoffesto okazos ĉi-jare la 19-an de decembro je la 16-a horo en la Anseesalono (Clubzaal) de Feestlokaal VOORUIT. Krom la kutimaj kunlaborantoj, ni jam - kaj kun ĝojo ! - povas anonci ke la lernantoj de nia kurso prezentos teatraĵon. Ĉiu esperantisto estos bonvena !

### KIAL VI LERNIS ESPERANTON ?

Certe ne nur por interŝanĝi poŝtkartojn, por surporti plian insignon aŭ por originale pasigi tempon ! Sed vi lernis Esperanton por havi senperajn rilatojn kun samideanoj el la tuta mondo, ekkoni opiniojn, pensojn kaj aspiracojn de alilandaĵ amikoj, ekkoni kulturon kaj vivon de aliaj regionoj, antaŭenpuŝi ĉiujn fortojn, kiuj luktas por paco, interkompreno kaj solidare sento inter ĉiuj homoj, starigo de demokratio kaj paca kunvivado en la tuta mondo.....

Se vi lernis Esperanton tiucele, vi nepre bezonas rimedon por kontakti samcelanojn. Jen helpo por vi ! Kiel ligilon kaj esprimiloŭ diversaj fakoj kaj frakcioj de S.A.T. kaj aliaj progresemaĵ tendencoj en Esperantio kunlabore eldonas la gazeton LA JUNA PENSO.

Ĉar LJP strebas utiligi la universalan lingvon cele al senklasa, sennacieca mondsocio, celas faciligi la interrilatojn de siaj abonantoj por krei forton senton de homeca solidaro, montras komprenemon kaj toleremon al la progresemaĵ skoloj aŭ sistemoj, celas per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado helpi al iĝo de libere pensantaj, sendogmaĵ homoj ; tial LJP estas verkata de la legantoj mem, kiuj sin esprimas libere kaj eventuale rebatu - kun toleremo - alies opinion. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas do la verkintoj mem. LJP bonvenigas ĉies kontribuojn kaj precipe tiujn pri aktualaj temoj sociaj, junularaj, ekonomiaj, politikaj, edukaj kaj kulturaj. Neniu temo estas tabuo. LJP dependas mone nur de siaj abonantoj. Povas aboni ĝin ĉiu ajn esperantisto, dank' al la reto de LJP-perantoj en diversaj mondpartoj. Krome LJP vi povas uzi kiel taŭgan materialon por interesaj diskutoj dum kunvenoj, aŭ kiel instruhelpilon por esperantokursoj. Viaj kursoj povas en ĝi aperigi siajn unuajn artikolojn. LJP servas ankaŭ al izoluloj : ĉiu numero ligan ilin kun la tuta mondo.

LA JUNA PENSO aperas akurate ĉiun duan monaton kun inter 20 kaj 30 paĝoj. Plurfoje jare aperas suplementoj senpagaj por la abonantero. Albert BRACKE, Tulpstraat 52, B 9000 - Gent/Belgio plezure akceptos vian abonkotizon : 80 Fr por unu jaro, 120 Fr por du jaroj. Poŝtĉeknu : 5008.63.

### KONKURSO "FORUMO - EUROPO - 71".

Pola Radio Varsovio invitas vin al partopreno en la konkurso "Forum - Eŭropo - 71". Ĝi petas vin respondi al jenaj demandoj : 1/ Kiel vi rilatas al la propono de la socialismaĵ landoj kunvoki konferencon pri la afero de la eŭropa sekureco kaj kunlaboro, kaj kion vi atendas de tiu ĉi konferenco ? 2/ Kiuj personoj en via lando kaj en kia maniero speciale meritiĝis por la laafero de la paco ?

Respondo al ambaŭ demandoj donas la eblon gajni lotumvoje unu el la ĉefaj premioj : 10-tagan ekskurson tra Pollando. La leteroj kun la respondoj vi devas direkti laŭ la adreso : Pola Radio, Varsovio 1, P.O. Box 46, Pollando, en kovertoj signitaj per la devizo : "Konkurso", ĝis la 31-a de decembro 1971. Decidos la dato de la poŝta stampo.

NI RICEVIS.

PACO, oficiala organo de la Mondpaca esperantista movado (MEM) - 4/1971. Ĝi enhavas i.a. artikolojn de Detlev Blanke (Poemoj de Heinrich Heine en Esperanto, Kelkaj konsideroj pri argumentado kaj argumentoj), de Rudi Graets (Le proksimorienta problemo - historie, Pri ideologiaj konceptoj de L.L.Zamenhof), kaj pri Angela Davis, la Organizo de Unuigintaj Nacioj kaj la Germana Demokratia Respubliko, Heinrich Mann 100-a jubileo de lia naskiĝo, Bruno Apitz kaj lia romano "Nuda inter lupoj", ktp.

INTERNACIA FERVOJISTO, organo de I.F.E.F. - sept./okto. 1971. I.a; LEIF-kongreso, La historio de Lugano, Klerigado ĉe fervojaj administracioj.

SILEZIAJ KANTOJ ; speciala literatura ĉeĥoslovaka numero de PACO (eldonita kun subteno de la Ministerio de kulturo EN Ĉeĥa sSocialisma respubliko.

TREFFPUNKT LEIPZIG publikigas la programon de la kulturaj manifestacioj dum unu monato (ĉi-okaze tiu de novembro 1971). Ĝi enhavas i.a. artikolon de nia samideano Otto Bässler pri la balotadokampoj DE la laboristaro en weimara respubliko, kaj inter centoj de PREzentadoj ĉiuspecaj troviĝas kvar de la laborgrupo Esperanto en Leipzig.

N	N	N	NNNNN	NNNNN	NNNNN	NNNNN	NNNNN	NNNNN	NNNNN	NNNNN
NN	N	N	N	N	N	N	N	N	N	N
N	N	N	NNNNN	NNNNN	NNNNN	NNNNN	NNNNN	NNNNN	N	N
N	NN	N	N	N	N	N	N	N	N	N
N	N	N	N	NNNNN	NNNNN	N	NNNNN	N	NNN	NNNNN

TIJDSCHRIFT

PERIODIKO

Al ..... *K-dino Stella De Werd,*  
 ..... *Rubensheide 61,*  
 ..... *1080- Kapellen*